# Novjorka Prismo

Numero 130 — Januaro 2004


*La Esperanto-Societo de Novjorko*
*kore invitas vin al sia januara kunveno . . .*

DATO: Vendredon, la 16-an de januaro 2004, 6:30-9:00 ptm


LOKO: United Federation of Teachers
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place), NYC

PROGRAMO: 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – Alex Karkovsky prelegos pri
**La Vivo kaj la Holokaŭsta Poezio de Julius Balbin.** ★

## Protokolo de nia Zamenhofa Festo, la 19-an de decembro 2003

Ĉeestis 16 personoj. Oni povis elekti el multaj specoj de manĝaĵoj el diversaj partoj de la mondo, aŭ kun aŭ sen viando, ekzemple: salatoj, nudeloj, terpoma salato, kiŝo, pico, kaj ĥumuso. Oni povis trinki vinon, sukon, karbonigitajn trinkaĵojn, kaj akvon.



La tuta familio Medrano ĉeestis. La filinoj, Rebecca kaj Emily, donis festotagajn kartojn al la ĉeestantoj. Je la antaŭa parto de la karto estas foto de la du knabinoj sidante antaŭ kristnaskarbo, vestigitaj en samaspektaj helbluaj ĉemizoj, brakumante unu la alian.



Du eraroj troviĝis en la novembra *Prismo*: Hans BAKKER estas nederlandano, ne germano; oni erare literumis la vorton *Unuiĝintaj* kiel *Unuiĝingtaj*.

La protokolo de la novembra kunveno estis akceptata.













Tomaso ECCARDT demandis, ĉu estas aliaj kandidatoj por la estraro. Aliajn nomojn oni ne menciis, kaj la kandidataro menciita en la novembra protokolo estos la estraro por la venonta jaro.

Mi, Stuart GREEN, parolis neformale kaj mallonge pri la signifo de la juda festotago de lumoj "Ĥanuko." Ĉijare la nokto de nia Zamenhofa Festo estis ankaŭ la unua nokto de Ĥanuko. Ni ne havis sufiĉe da tempo por diskuti pri la vivo de Zamenhof, kreinto de nia lingvo kaj fondinto de nia movado.

Je 9:00 ptm, la festo finiĝis, kaj la ĉeestantoj tuj foriris. ★

*Protokolis: Stuart GREEN*

## Jen! Ĝi Fuŝitis

*de Maurice WITTENBERG*

Elpensatas, elpensatas,
elpensatas, jen!

Elpensitis.

Kiam Ludoviko, kalvakapa,
orienteŭropa, iris al la Francoj
kun la lingvo de li elpensita,

Ili ne povis volonte akcepti de li,
nelingvisto, nelogistikisto,
la lingvon kia ĝi estis,

Do ili korektis ĝin.

Sed Ludoviko, genia sed neimpona,
ne volis ke oni malakceptu,
do li estis diplomata,

Li havis lingvon preskaŭ perfektan,
sed oni trovis neperfektaĵojn kaj
oni estis tiel saĝaj, tiel sagacaj,

Pro multo da arboj ili la belan
arbaron ne vidis,

Sed Ludoviko estis diplomata.

Laŭ de Beaufront ĝi ne estis sufiĉe
logika, do li elpensis Idon,

Laŭ Jespersen anglamanto ĝi ne estis
sufiĉe angleca, do li elpensis
Novialon,



Baldaŭ venis la
Neologistoj,
enkondukantaj
nenecesajn kaj
malbelajn
vortojn,

Baldaŭ venis la
Kia-istoj kaj la
Tiom-Kiom-istoj,
nevenkeblaj de de Hoog,

Baldaŭ venis la Ata-istoj, disĉiploj
de Meier, nevenkeblaj de
Schwartz,

Baldaŭ venis la Fare-de-istoj kaj la
far-istoj, kvankam Ludoviko
rekomendis la malpli barbaran
"flanke de",

Baldaŭ venis la Li-aŭ-Ŝi-istoj,
kvankam Ludoviko eksplikis la
ambaŭseksajn proprecojn de "li",

Baldaŭ venis la Antas-Ontas-Intas-
istoj, kaj la Atas-Otas-Itas-istoj, iliaj
fratoj,

Fuŝatas, fuŝatas, fuŝatas, jen!

Fuŝitis. ★

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Januaro 2004** — **16**

ESNY KUNVENO
Alex Karkovsky: La Vivo kaj la
Holokaŭsta Poezio de Julius Balbin
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**Februaro** — **1**

Tagmanĝo
*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe* ***IBM Plaza***
(Limdato por kontribuaĵoj por *Prismo* 131)

**20**

ESNY KUNVENO
*Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT*

**United Federation of Teachers (UFT)**
50 Broadway, Second Floor, Room A
(between Bowling Green and Exchange Place)

**"IBM" Building Atrium** (antaŭa nomo)
590 Madison Avenue (56th Street) NYC
Street level, in the Atrium


## IBM Plaza



Dimanĉon, la 4-an de januaro, pli malpli 10 gesesperantistoj ĉeestis neformalan kunvenon ĉe IBM Plaza. Inter ili, estis nova esperantisto, Brian DRAKE, kiu studis Esperanton nur kelkajn monatojn, sed jam bone parolas. ★

*– Tom ECCARDT*

## Saluton!



Bonvolu diri al viaj membroj, ke mi ĝuas legi pri vi ĉiuj en la *Novjorka Prismo.* ★

*– Prenda COOK*
*pere de Sofiya SOSKINA*

## Paĝintaj anoj de Esperanto-Societo de Novjorko 2003

| | | | |
|---|---|---|---|
| George Baker | Eni S. Fernandes | Martin L. Levine | Lillian Rachele |
| Lynn C. Bartlett | Adolph Fuerst | Pamela Lieber | Douglas M. Rose |
| Ulrich Becker | Margot H. Gerson | Jon Liechty | Maki Sano |
| Marta L. Bergonzoli | Stuart M. Green | Cécile Low | Isolde Schehr |
| Jeff Blakeslee | Rochelle F. Grossman | Steve Mann | Jake Schneider |
| Nijl Blonstein | Takaki Julian Hashimoto | Eugene Markov | Ŝijimin |
| Arturo Bonetti | Micutaki Inui | Jim Medrano | Sofiya Soskina |
| Paul J. Burke | Pierre Jelenc | Nancee Medrano | Witold Symonowicz |
| Norman B. Calvert | Renata Kaczmarska | Rebecca Medrano | Gloria C. Taylor |
| E. Semra Çelik | Alex Karkovsky | Emily Medrano | Arnold Victor |
| Richard P. Connell | David Kobaladze | Carlos E. Ortiz | Shep Wahnon |
| Leonard Dzelzitis | Susan D. Kohn | Dan Perlman | Maurice J. Wittenberg |
| Thomas M. Eccardt | Lee Chong-Yeong | Susan Polgar | Tomoko Yamashiro-Petrov |
| Jill Sophia Fein | Thomas Leong | Mary Pulley | Yingjie Zhang |

Sumo: 56

*Krome, 10 personoj aŭ grupoj abonis* Novjorkan Prismon. ★

*Feliĉan Novjaron!*


ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO
c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041
http://www.geocities.com/esperanto_nyc

| Prezidanto | Korespondа Sekretariino | Protokolisto |
|---|---|---|
| Thomas Eccardt<br>(212) 477-6516 | Rochelle F. Grossman<br>(718) 457-1490 | Stuart Green<br>(631) 751-5683 |
| **Vicprezidanto** | **Kasistino** | **Program-Direktoro** |
| Thomas Leong<br>(718) 981-4252 | Sofiya Soskina<br>(914) 738-6084 | Neil Blonstein<br>(212) 663-2020 |



**Novjorka Prismo**
Numero 130 – Januaro 2004
ISSN: 1059-5627
http://members.aol.com/novjorka/prismo

| Redaktoro | Subredaktoroj | Desegnistino |
|---|---|---|
| Jim Medrano<br>(212) 982-5029 | Thomas Eccardt<br>Nancee Medrano | Mary Pulley |

Sendu kontribuaĵojn al:
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103
e-poŝto: medrano@mac.com


© 2004 Esperanto Society of New York